Joseph Freiherr von Eichendorff,

# Morgengebet

O wunderbares, tiefes Schweigen,
Wie einsam ist's doch auf der Welt!
Die Wälder nur sich leise neigen,
Als ging' der Herr durch's stille Feld.

Ich fühl' mich recht wie neu geschaffen.
Wo ist die Sorge nun und Not?
Was mich noch gestern wollt' erschlaffen,
Ich schäm' mich des im Morgenrot.

Die Welt mit ihrem Gram und Glücke
Will ich, ein Pilger, frohbereit
Betreten nur wie eine Brücke
Zu dir, Herr, über'n Strom der Zeit.

Und buhlt mein Lied, auf Weltgunst lauernd,
Um schnöden Sold der Eitelkeit:
Zerschlag mein Saitenspiel und schauernd
Schweig' ich vor Dir in Ewigkeit.

. . .

Joseph Freiherr von Eichendorff,

# Matena preĝo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Profunda estas la silento
Ankoraŭ en la mondo ĉi!
La arboj nur en softa vento
Sin klinas kvazaŭ antaŭ Di'.

Mi sentas min kreita ree,
Mizer' kaj zorgo estas for.
Pro kio mi plendadis vee?
Mi hontas nun en la aŭror'.

Nur kiel pilgrimant' surtreti
Sinjor', la mondon volas mi,
Trairi ĝin kaj ĝoje preti,
Ĝis ree venos mi al Vi.

Se sentas en la kor' deziron
Pri vanta monda gloro mi,
Disbatu, Dio, mian liron
Kaj mi silentos antaŭ Vi.[2]

. . .

[2] aŭ:
Mi ĉiam mutos antaŭ Vi.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26).*

*Arg-677-1361 (2012-11-24 22:26:38)*

*Vidu la retejojn* `http://www.textlog.de/22712.html` *kaj* `http://gedichte.xbib.de/--66155_36367_60231_63386--.htm`.

*Traduko de la Germana poemo "Morgengebet" de* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984.*

*MR-164-1 / Arg-677-1362 (2012-11-24 22:29:52)*

*Pri la poeto vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Joseph_von_Eichendorff` *respektive la germanan versio de vikipedio* `http://de.wikipedia.org/wiki/Joseph_von_Eichendorff`.